

Fulmtranĉilo

La kolero de la kajovajoj afliktis nin. Nia sekuro estis en danĝero. Kiam ni rekuŝiĝis, estis tial decidita, ke ni gardu horŝanĝe ĝis la mateno. La ruĝuloj nature ekkonis tiun gardiĝan rimedon tuj. Memkompreneblis, ke ili malbone akceptis tion, kaj kondukis nun eĉ pli neamikece ol antaŭe.

Kiam ĝi mateniĝis, nia gardisto nin vekis. Ni vidi, ke la kajovajoj ankoraŭ serĉis la fuĝintajn ĉefojn, kiujn ili ne kaptis dum la nokto. Finfine ni trovis la spuron, kaj sekvis ĝin. Ĝi kondukis al la loko, en kiu la apaĉoj estis lasintaj iliajn ĉevalojn antaŭ la atako. Intŝu-tŝuna kaj Winnetou estis forrajdintaj kun la ĉevalgardistoj, ne kunprenis iun alian ĉevalon, sed lasis ĉiujn ĉevalojn tie. Kiam ni eksciis tion, Sam Hawkens faris sian ruzan mienon, kaj demandis min:

„Ĉu Vi eble povas pensi, *Sir*, kial la du ĉefoj faris tion?“

„Jes. Estas tute ne malfacile divenebla.“

„Hoho, *Sir!* Tia *greenhorn* kiel Vi ja ne imagu, ke li estus trovanta ekzakte la ĝustan penson nur per hazardo. Necesas sperto, pro respondi al mia demando.“

„Mi ĝin havas.“

„Ĉu Vi? Sperton, ĉu? Mi scivolos, de kie ĝi estus veninta! Ĉu Vi posedas la afablecon diri tion al mi?“

„Kial ne? Mi ĉerpis mian sperton el libroj.“

„Viaj libroj denove! Eble Vi feliĉis unu fojon legi ion, kio povas utili al Vi tie ĉi. Sed tial Vi ja ne jam pensu, ke Vi elĉerpis la tutan puton de la saĝeco. Mi tuj pruvos al Vi, ke Vi scias nenion, vere tute nenion. Do, kial la du fuĝintaj ĉefoj kunprenis nur iliajn proprajn ĉevalojn, kaj lasis tiujn de la aliaj kaptitoj tie ĉi?“

„Ĵus pro la kaptitoj.“

„Ha! Kial?“

„Ĉar la kaptitaj apaĉoj boneble baldaŭ bezonos iliajn ĉevalojn.“

„Ĉu Vi opinias tion? Kion la kaptitoj nu faru kun iliaj ĉevaloj?“

Per liaj demandoj mi tute ne sentis min ofendata. Tio ja nur estis lia tipa maniero. Tial mi respondis:

„Du kazoj povas okaziĝi. Aŭ la du ĉefoj baldaŭ revenos kun pli granda aro, pro liberigi la kaptitoj. Nu kial ili unue kunprenu la ĉevalojn, kaj poste realportu ilin tiukaze? Aŭ la kajovajoj ne atendas la alvenon de la apaĉoj, sed foriĝos de tie ĉi kun iliaj kaptitoj. Tiukaze la situacio estus plifaciligata, ĉar ili povas rajdi. Ilia transporto estus multe pli malkomplika. Esperindas, ke ili estos forkondukata, kaj eble povos esti liberigata sur la vojo. Se ili sede ne havus ĉevalojn, kaj devus iri surpiede, la kajovajoj eble ekhavas la ideon eviti la malfacilan kaj enuigan transporton, perke ili mortigus ilin jam tie ĉi.“

„Hm! Tio vere ne estas tiel stulte pensita, kiel oni ĝin povis ekspekti laŭ Via vizaĝo. Sed Vi forgesis trian eblecon. Fakte ankaŭ eblas, ke la kajovajoj mortigos la kaptitojn, sen ion pensi pri la ĉavaloj.“

„Ne, tio ne eblas.“

„Ĉu ne? Sir, kiel Vi povas ekhavi la ideon deklari ion neebla, kion Sam Hawkens supozas ebla?“

„Ĉar tiu Sam Hawkens ŝajne forgesis, ke ankaŭ ĉeestas mi.“

„Ha, ĉeestas Vi, ĉu? Ĉu tio veras? Vi do supozas Vian altestiman ĉeeston esti tute elstara, aŭ eĉ mondgrava okazaĵo, ĉu?“

„Ne. Mi nur volis diri, ke la kaptitoj ne estos mortigata, dum mi ankoraŭ ĉeestos kaj povas movifingron por ili.“

„Ĉu vere? Kia grava ulo Vi ja estas, hihihhi! La kajovajoj havas la forton de ducent viroj, kja Vi, la greenhorn, volas malhelpi al ili, dum ili faras, kio plaĉas al ili, ĉu!“

„Mi ja esperas, ke mi ne staras sole.“

„Ĉu ne? Pri kiu Vi volas fidi krome?“

„Pri Vi, Sam, kaj ankaŭ pri Dick Stone kaj Will Parker. Mi estas tute certa, ke Vi ne permesos amasmurdon.“

„Nu! Do Vi ankoraŭ fidas pri ni! Mi treege dankas al Vi pro tio, ĉar vere estas bona aĵo, havi la fidon de tia viro. Fakte mi sentas min iom fiere pri tio, se mi n'eraras.“

„Sam, mi parolis serioze, kaj ne havis la intencon ŝerci pri tiu afero. Se la afero prias tiom multajn homvivojn, la ŝercado ĉesu!“

Li moke briletis al mi per siaj okuletoj.

„Fulmotondro! Do tio vere seriozas al Vi, ĉu? Nu, tiukaze mi faru tute alian mienon dum tio. Sed kion Vi pensas, kiel ĉi ĉio okaziĝos, *Sir*? Ni ne povas fidi pri la aliaj. Do ni estas nur kvar personoj, kiuj volas eventuale venki ducent kajovojn. Ĉu Vi opinias, ke tio povos havi bonan finon?“

„Mi ne demandas pri la fino. Mi ne povas toleri, ke tia murdado okazos.“

„Tamen ĝi okazos, nur kun la diferenco, ke Vi kune estos neigata. Aŭ ĉu Vi volas fidi pri Via nova nomo Old Shatterhand? Ĉu Vi opinias, ke Vi povos terenbati ducent ruĝaj militistoj per Viaj pugnoj?“

„Stultaĵo! Mi ne elektis tiun nomon mem, kaj scias ekzakte, ke ni kvar ne povas venki la ducent. Ofte pli bonas ruziĵo.“

„Ĉu? Certe Vi ankaŭ legis tion, ĉu?“

„Jes.“

„Prave! Kaj kia terure saĝa ulo Vi estiĝis per tio. Mi vere ŝate volus vidi vin esti ruze. Kian vizaĝon Vi do eble farus dum tio? Mi diras al Vi, ke nenio fareblas tie ĉi, malgraŭ ĉia ruzeco. La ruĝuloj faros, kion ili volas, kaj tute ne zorgos pri ĉu ni faras minacajn aŭ ruzajn mienojn dum tio.“

„Bone! Mi vidas, ke mi ne plu povas fidi pri Vi, kaj do mi agos sole, se oni devigas min.“

„Pro Dio, ne faru stultaĵon, *Sir*! Vi ne faru ion tute sole, sed faru, kion faros ni. Mi je tute ne volis diri, ke mi ne volas zorgi pri la apaĉoj, sed vere neniam estis mia maniero provi disrompi dikajn murojn per la kapo. La muroj ĉiam estas pli solidaj ol la kapo.“

„Kaj same mi ne volis diri, ke mi volus fari nefareblaĵon. Intertempe ni ja ne scias, kion la kajvajoj volas fari kun iliaj kaptitoj, do ni ne jam bezonas peniĝi per afliktoj. Sed se ni iam estos devigataj agi, ja troveblos solvo.“

„Eble. Sed singardema viro ne fidu pri tio. Kio troveblos, tio tute ne estas mia afero. Ni pensu pri tute certa demando, kaj tiu estas: kion ni faros, se la apaĉoj estu mortigataj?“

„Ni ne permesos tion!“ mi diris.

„Tio estas malplena parolaĉo! Ne permesos! Esprimu Vin pli klare!“

„Ni protestos kontraŭ tio.“

„Tio ne sukcesos.“

„Tiukaze mi devigos la ĉefon agi laŭ mia volo.“

„Kiel Vi volas fari tion?“

„Mi metos mian tranĉilon sur lian bruston, se ne estos alia ebleco.“

„Kaj Vi mortpikos lin, ĉu?“

„Se li ne obeos al mi, jes.“

„Diablo, kia rabia homo Vi estas!“ li vokis terurigite. „Kaj fakte tio ekspekteblas pri Vi!“

„Mi certigas Vin, ke mi faros ĝin!“

„Tio estas— tio estas—“ li eksilentis. Lia unue terurigita, kaj tiam afliktita mieno iom post iom haviĝis alian esprimon. Finfine li pluis: „Tiu ideo tute ne aĉas. Meti la tranĉilon sur la bruston de la ĉefo, estos en tiu kazo boneble la sola ŝanco devigi lin fari, kion ni volas. Vere ĝustas, ke eĉ *greenhorn* foje povas havi bonan, tiel nomatan etan ideon. Tiun ni memoru.“

Li volis paroli plu, sed Bancroft venis, kaj postulis, ke mi komencu labori. La inĝeniero pravis. Ni ne perdu unu horon, se ni ankoraŭ volis finiĝi nian mezuradon, antaŭ alvenis Intŝu-tŝuna kaj Winnetou kun iliaj militistoj.

Ni intense okupiĝis ĝis la tagmezo. Tiam Sam Hawkens venis al mi, kaj diris:

„Bedaŭrinde mi devas ĝeni Vin, *Sir*: La kajovajoj ŝajnas plani ion pri iliaj kaptitoj.“

„Ĉu ion? Tio tre neklaras. Ĉu Vi do ne scias, kion ekzakte?“

„Mi povas ĝin supozi, se mi n'eras. Ili volas lasi ilin ekmorti je la torturofosto.“

„Kiam? Ĉu post kelka tempo, aŭ baldaŭ?“

„Kompreneble baldaŭ. Alikaze mi ne estus veninta al Vi nun. Ili faris pretigaĵojn, el kiuj mi konkludas, ke la apaĉoj estu torturotaj, tre baldaŭ.“

„Ni nebligu tion! Kie estas la ĉefo?“

„Ĉe siaj militistoj.“

„Ni logu lin for de ili. Ĉu Vi bonvolu fari tion, Sam?“

„Jes, sed kiel mi ĝin faru?“

Esploru mi ĉirkaŭrigardis. La kajovajoj estis sekvintaj niajn mezuradojn, kaj restis je la rando de eta preria arbaro. Rattler kaj siaj anoj estis ĉe ili, kaj Sam Hawkens ĝis nun estis ĉirkaŭirinta en ilia proksimo, pro rigardi ilin. Parker kaj Stone sidis proksime al mi. Inter la ruĝuloj kaj mi estis arbedo, kiu tre bone taŭgis al miaj intencoj. Ĝi baris la transvidon de la kajovajoj al mi.

Mi respondis al la demando de Sam:

„Simple raportu al li, ke mi diru ion al li, sed ne povas interrompi mian laboron. Tiel li certe venos.“

„Mi esperas tion. Sed kio, se li kunvenigos kelkajn *indsman*:ojn?“

„Vi kaj Stone kaj Parker okupiĝu pri ili. Pri li mem okupiĝos mi. Prenu kelkajn rimenojn prete, proke ni povos fiksligi ilin. La afero okaziĝu rapide, kaj laŭeble mallaŭte.“

„*Well*, mi ne scias, ĉu tiu estas la ĝusta ago, kiun Vi planas. Sed ĉar mi ne havas pli bonan ideon, ni agu laŭ Via volo. Ni riskas niajn vivojn, sed ĉar mi ne jam sentas emon ekmorti, mi pensas, ke ni iĝu el la afero, ankaŭ eble kun kelkaj lezoj, se ĝi estu, hihihih!“

Sam foriĝis. Miaj sinjoroj kolegoj laboris proksime de mi, sed ne povis aŭdi nian interparolon. Ankaŭ eĉ ne ekideis al mi sciigi ilin, kion mi volis fari. Mi certis, ke ili estus provintaj eviti kion mi planis. Iliaj propraj vivoj valoris plie al ili, ol tiuj de ĉiuj kaptitaj apaĉoj.

Mi sciis, kion mi volis riski. Ĉu mi rajtis, kunŝiri Dick Stone:on kaj Will Parker:on en la danĝeron, senke mi antaŭe estis avertinta ilin? Ne. Do mi demandis ilin, ĉu mi lasu ili ekster la afero.

„Ni ja vere protestu, *Sir*!“ Stone respondis indigne. „Ĉu Vi pensas, ke ni estas fiuloj, kiuj ne helpas al amiko, kiu troviĝas en danĝero? Kion Vi planas estas vera, brava okcidentula petolaĵo, en kiu ni partoprenos per plena plezuro. Ĉu ne, olda Will?“

„Jes“, Parker certigis. „Mi ja volas vidi, ĉu ni kvar estas la ĝustaj uloj pro defii la forton de ducent *indsman*:oj. Mi ĝojas jam nun, kiam mi imagas, kiel ili kriante alkuros, sed tamen estos devigataj ne ataki nin!“

Mi plulaboris trankvile, kaj ne videtis malantaŭ mian ŝultron, ĝis Stone vokis al mi post kelka tempo:

„Pretiĝu, *Sir*, ili venas!“

Nun mi turniĝis. Sam venis kun Tangua. Bedaŭrinde krome estis tri ruĝuloj kun li.

„Ĉiu el ni unu viron“, mi diris. „Mi okupiĝos pri la ĉefo. Ekprenu ilin je la gorĝo, pro ili ne povos ekkrii, kaj dece atendu, ĝis mi ekagos. Ne komencu antaŭ tio!“

Mi malrapide iris renkonte al Tangua. Stone kaj Parker sekvis min. Kiam ni renkontis, ni staris tiel, ke la aliaj kajovajoj ne povis vidi nin per la menciita arbedo. La ĉefo faris tute ne ĉarman mienon, kaj diris malamikece:

„La palvizaĝo, kiu estas nomata Old Shatterhand, min venigis. Ĉu vi forgesis, ke mi estas la ĉefo de la kajovajoj?“

„Ne, mi scias, kiu vi estas“, mi respondis.

„Tiukaze vi devas veni al mi, anstataŭ mi al vi. Sed ĉar mi scias, ke vi troviĝas en tiu ĉi lando nur mallonge, kaj ke vi ankoraŭ lernu esti ĝentila, mi pretas pardoni tiun misaĵon de vi. Kion vi diru al mi? Parolu mallonge, ĉar mi ne havas tempon!“

„Kion vi faru tiel urĝe?“

„Ni volas hurligi la apaĉajn hundojn.“

„Kiam?“

„Nun.“

„Kial jam nun? Mi pensis, ke vi volas kunpreni la kaptitojn en vian vigvamejojn, pro lasi ilin ekmorti tie en la ĉeesto de viaj *squaw*:oj kaj infanoj.“

„Ni volis. Sed ili estus malutilaj al ni dum nia militado. Tial ili perdu iliajn vivojn jam hodiaŭ.“

„Mi petas vin ne fari tion.“

„Vi ne rajtas peti“, li ekkriis al mi.

„Ĉu vi ne volas paroli al mi same ĝentile, kiel mi al vi? Mi nur elparolis peton. Nur se mi havus la intencon ordoni al vi, vi eble havus kaŭzon esti krude.“

„Mi volas aŭdi nenion de vi, nek ordonon, nek peton. Neniu palvizaĝo povas ŝanĝi ion je mia decido.“

„Sed eble jes! Ĉu vi havas la rajton mortigi la kaptitojn? Mi ne volas aŭdi vian respondon, ĉar mi ĝin konas, kaj mi ne disputos pri ĝi kun vi. Sed estas diferenco mortigi homon rapide kaj sendolore, aŭ malrapide torturi lin ĝismorte. Ni ne akceptos, ke tio okazu dum nia ĉeesto.“

Li rektiĝis pli alten, kaj malestime respondis:

„Ne akceptos, ĉu? Kiu vi estas, laŭ via supozo? Kompare al mi, vi estas kiel bufo, kiu volas obstini kontraŭ la urso de la roka montaro. La kaptitoj estas mia posedaĵo. Mi agos pri ili, kiel mi volas.“

„Ili iĝis viaj kaptitoj nur per nia helpo. Tial ni havas la egalan rajton pri ili kiel vi. Ni deziras, ke ili restu vivantaj.“

„Deziru, kion vi volas, blanka hundo. Mi ridas pri viaj vortoj!“

Li kraĉis antaŭ miajn piedojn, kaj volis turniĝi, tiam mia pugno ektrafis lin tiel, ke li falis teren. Sed li havis stabilan kranion, ne estis tute senkonsciigita, kaj tuj volis restariĝi. Tial mi kliniĝu malsupren ĉe li, pro doni kroman baton al li, kaj unu momenton mi ne povis atenti pri la aliaj. Kiam mi estis doninta la duan baton al li, kaj rerektiĝis, mi vidis Sam Hawkens: on genui sur ruĝulo, kiun li fiksprenis je la gorĝo. Stone kaj Parker venkis la duan. La tria forkuris laŭte vokante.

Mi ekhelpis al Sam. Kiam ni estis fiksliginta lian kajovajon, ankaŭ Dick kaj Will estis finiĝintaj pri ilia viktimo.

„Tio ne estis saĝe de Vi“, mi diris. „Kial Vi lasis la trian forkuri?“

„Ĉar mi atakis la saman viron, al kiu ankaŭ Stone celis“, Parker respondis. „Per tio ni perdis du sekundojn, sed tio estis sufiĉe da tempo por la tria fiulo foriĝi.“

„Ne damaĝas“, Sam Hawkens konsolis. „Tio nur havos la konsekvencon, ke la danco komencos iom pli frue. Ni ne kverelu pri tio. La ruĝuloj estos tie ĉi post du aŭ tri minutoj. Ni zorgu, ke ni havos sufiĉe da libera spaco inter ni kaj ili!“

Ni enkatenigis la ĉefon. La *surveyor*:oj estis ĉion rigardintaj ektimigite. La ĉefingenero kure venis al ni, kaj kriis terurigite: „Kion Vi faras tie, homoj! Kion la indianoj faris al Vi? Nun ni ĉiuj pereos.“

„Fakte tio okazos, *Sir*, se Vi ne tuj batalos je nia flanko. Alvoku Viajn anojn, kaj venu al ni! Ni savos Vin.“

„Vi, ĉu savos nin? Tio ja estas—“

„Silentu!“ la malgrandulo interrompis lian parolon. „Ni scias tute ekzakte, kion ni faras. Vi pereos, se Vi ne stariĝas je nia flanko.“

Ni levis la tri katenitajn indianojn, kaj portis ilin kelkajn paŝojn for sur la ebenan prerion, kie ni metis ilin sur la teron. Bancroft estis sekvinta nin kun la tri *surveyor*:oj. Ni elektis tiun lokon, ĉar ni estis pli sekure sur la libera areo ol sur alia, kiun ni ne povis plene supervidi.

„Kiu parolu kun la ruĝuloj, kiam ili venos? Eble mi, ĉu?“ mi demandis.

„Ne, *Sii*“, Sam respondis, „mi faros tion, ĉar Vi ja ne jam komprenas la duonindianan lingvomikson tute bone. Sed helpu al mi en la ĝusta momento, kaj agu, kvazaŭ Vi volus mortpiki la ĉefon.“

Li apenaŭ finparolis, kiam ni ekaŭdis la kolerokriadon de la kajovajoj. Unu momenton poste ni vidis ilin aperi ĉe la menciita arbedo, kiu estis nia ŝirmaĵo. Sed ĉar ĉiu el ili volis esti pli rapide ol la alia, ili ne estis kuna aro, sed longa vico el unuopaj kurantoj. Tio estis utila al ni, ĉar kuniĝinta aro ne estus estinta same facile ŝtopebla.

Sam iris renkonte al ili, kaj signis al ili ekstari per la brako. Mi aŭdis, ke li vokis ion al ili, sed ne komprenis tion. Ĝi ne tuj havis la intencitan efikon, sed kiam li estis ripetinta sian vokon kelkajn fojojn, mi vidis, ke la antaŭaj kajovajoj ekstaris. Ankaŭ la sekvantaj ruĝuloj ĉesis kuri. Mi diris al Stone kaj Parker, ke ili rektigu la ĉefon, kaj minace svingegis mian tranĉilon antaŭ li. La ruĝuloj elpuŝis laŭtan krion.

Sam parolis plu al ili. Tiam ni vidis, ke subĉefo de la kajovajoj disiĝs el la aro, kaj paŝis al ni kune kun Sam, malrapide kaj dignoplene.

Kiam ili estis atingintaj nin, Sam montris al niaj tri kaptitoj, kaj diris:

„Vi vidas, ke vi aŭdis la veron de mi. Ili estas sub nia forton.“

La subĉefo vidis furioze al siaj samtribanoj, kaj respondis:

„Tuj du katenitaj ruĝaj militistoj ankoraŭ vivas. Sed la ĉefo ŝajnas morti!“

„Li ne mortas. La pugno de Old Shatterhand bategis lin teren, kaj li perdis la konscion. Sed ĝi revenos. Atendu tion, kaj sidiĝu ĉe ni. Kiam la ĉefo estos regajninta la konscion, kaj repovos paroli, ni diskutos kun li. Sed intertempe, kiam nur unu el la kajovajoj direktigas sian armilon kontraŭ ni, la tranĉilo de Old Shatterhand tuj iĝos en la koron de Tangua. Certu pri tio.“

„Kial vi volas agi kontraŭ ni, kvankam ni estas viaj amikoj!“

„Amikoj, ĉu? Vi ja eĉ ne kredas mem, kion vi diris!“

„Mi kredas. Ĉu ni ne fumis la pipon de la paco kun vi?“

„Jes, sed oni ne povas fidi pri tiu paco.“

„Kial?“

„Ĉu estas kutimo de la kajovajoj, ke ili ofendas iliajn amikojn kaj fratojn?“

„Ne.“

„Nu, via ĉefo ofendis Old Shatterhand:on, do ni ne rigardu vin plu kiel fratojn. Sed, li ekmoviĝas!“

Tangua, kiun Stone kaj Parker estis remetintaj sur la teren, malfermis la okulojn, kaj vidis al unu post la alia, kvazaŭ li unue divenu, kio okazis. Tiam la konscio ŝajnis tute reveni en lin.

„Uf, uf! Old Shatterhand batis min teren. Kiu katenis min?“ li vokis kolere.

„Mi“, mi respondis.

„Oni prenu la rimenojn de mi. Mi ĝin ordonas!“

„Antaŭ kelkaj momentoj vi ne volis aŭdi mian peton. Nun mi ne obeas vian ordonon. Vi ne havas la rajton ordoni al ni!“

Liaj okuloj direktiĝis al mi kun furioza vido.

„Silentu, aŭ mi frakasos vin!“ li grumblis.

„Silentado estus pli saĝe de vi, ol de mi. Vi ofendis min, kaj vi estis batita teren pro tio. Old Shatterhand ne akceptas, ke oni nomas lin bufo kaj blanka hundo sen reago. Se vi ne iĝas pli ĝentile, eĉ pli malbonaj aĵoj povos okazi al vi.“

„Mi postulas esti liberigata! Se vi ne obeas al mi, miaj militistoj forigos vin de la supraĵo de la tero!“

„Vi parolas kiel viro sen kapo. La unua, kiu estos forigata, estas vi. Tie staras viaj anoj. Se nur unu el ili eklevas la piedon, pro proksimiĝi sen permeso, la klingo de mia tranĉilo iĝos en vian koron, *Hongh!*“

Mi metis la pinton de la tranĉilo sur lian bruston. Li devis kompreni, ke li estis sub nia forto, kaj certe ne plu dubis, ke mi realigus mian minacon. Li silentis kelkan tempon, kaj vidis al ni per furioze jen kaj reen moviĝantaj okuloj. Tiam li klopodis ekregi sian koleron.

„Kion vi volas de mi?“ li demandis rimarkeble pli trankvile.

„Nenion pli multe ol tion, pri kiu mi petis vin antaŭ kelkaj minutojn. La apaĉoj ne ekmortu sur la torturofosto.“

„Do vi postulas, ke ili tute ne estu mortigota?“

„Agu pri ili, kion vi volas pli poste. Kiel longe ni estas tie ĉi, tiel longe nenio okazu al ili.“

Refoje li pripensegis silente. Malgraŭ la militfarbo sur lia vizaĝo oni vidis, ke ĝi tremis per kolero, malamo kaj malica ĝojo. Mi estis ekspektinta, ke la disputa parolado inter ni daŭriĝus pli longe. Tial mi ekmiris, kiam li nun diris:

„Ĝi okaziĝu laŭ via deziro. Mi eĉ akceptos iom pli, se vi ankaŭ akceptos la proponon, kiun mi faros al vi.“

„Kiu propono tio estas?“

„Ne pensu, ke mi timas antaŭ via tranĉilo. Vi ja tute ne intencas mortpiki min. Se vi farus tion, vi estus disŝirota de miaj militistoj nur malmultajn minutojn poste. Eĉ se vi bravas, vi ne povas venki ducent kajovojn. Tamen la apaĉaj hundoj ne ekmortu sur la torturofosto. Mi eĉ promesas al vi, ke ni mortigos ilin tute ne, se vi akceptas batali pri vivo aŭ morto.“

„Kun kiu?“

„Kun unu el miaj militistoj, kiun mi elektos.“

„Kiu armilo?“

„Nur la tranĉilo. Se li mortpikos vin, ankaŭ la apaĉoj ekmortu. Sed se vi mortpikos lin, ili ne ekmortu, kaj eĉ estu liberigotaj.“

Mi povis esti certe, ke li havis ian kaŝitan penson dum tio. Verŝajne li supozis, ke mi estis la plej danĝera el la ĉeestantaj blankuloj, kaj volis sendanĝerigi min. Kompreneblis per si mem, ke li tutcerte elektos majstron de la tranĉila skermado. Tamen mi respondis, sen longe pripensadi:

„Mi akceptas. Ni interkonsentiĝu pri la kondiĉoj, kaj fumu la pipon de ĵuro pri tio. Tiam komencu la batalo.“

„Kion Vi faras!“ Sam Hawkens vokis. „Mi neniamaniere povas toleri, ke Vi vere faras la stultaĵon akcepti tiun batalon, *Sir!*“

„Ne estas stultaĵo, Sam.“

„La plej granda, kiu eblas. Je justa kaj honesta batalo la ŝancoj estu egalaj. Sed tio ne estos la kazo tie ĉi. Ĉu Vi ajn iam jam batalis pri vivo aŭ morto per la tranĉilo?“

„Ne.“

„Nu do! Vi verŝajne havos kontraŭulon, kiu estas majstro de la tranĉilbatalo. Pensu pri la konsekvencoj! Se vi estos mortpikata, la apaĉoj ankaŭ ekmortos. Sed se via kontraŭulo estos mortpikata, kiu ekmortos tiukaze? Neniu homo, escepte li!“

„Sed la apaĉoj gajnos iliajn vivojn, kaj eĉ la liberon.“

„Ĉu Vi vere kredas tion?“

„Jes, ĉar tio estos certigata per la kalumeto. Tio valoros kiel ĵuro.“

„La diablo fidu pri ĵuro, kiu estas dirata kun cent kaŝaj kontraŭpensoj! Eĉ se ĝi estus serioza, Vi estas *greenborn*, kaj—“

„Ĉesu Vian *greenborn*-adon, Sam!“ mi interrompis lian parolon. „Vi ja sufiĉe ofte spertis, ke tiu *greenborn* tute konscias pri kio li faras.“

Tamen li kontraŭparoladis longan tempon. Ankaŭ Dick Stone kaj Will Parker konsilis al mi, ne agi tiel. Sed mi restis fidele al mia decido.

„Bone, pro mi do kuru tra dek aŭ dudek muroj kun Via obstimema kapo!“ Sam fine vokis ĉagrenite. „Mi tute ne kontraŭos plu. Sed mi garde atentis, ke ĉio dum la batalo okazos egalrajte. Ve al tiu, kiu volas trompi Vin aŭ nin! Mi pafos lin per mia Liddy en la aeron, ke li restos disbatita je mil pecoj en la nuboj, se mi n’eraras!“

Nun la kondiĉoj estis interkonsentigitaj. Sur proksima, senherba loko estu fosetota ok (8) en la sablon. Ambaŭ kontraŭuloj stariĝu en unu de la du cirkloj, kiun li ne rajtis forlasi dum la batalo. Kompato ne estu. Unu el la du ekmortu, sed la familianoj de la mortigota ne rajtu venĝiĝi pri la venkonto. La kromaj kondiĉoj jam estis interkonsentigitaj.

Kiam ni finparolis, la ĉefo estis malkatenata. Mi fumis la kalumeton kun li. Poste ni liberigis ankaŭ la du aliajn katenitojn. La kvar kajovajoj iris al iliaj kunuloj, pro raporti al ili ri la estonta spektaklo.

La ĉefingenero kaj la aliaj *surveyoroj* riproĉis min. Mi ne atentis pri tio. Ankaŭ Sam, Dick kaj Will ne konsentis pri mia decido, sed almenaŭ ili lasis min trankvile. Hawkens diris afliktite:

„Vi povis fari pli bonajn aĵojn, ol akcepti tiun diablaĵon, *Sir!* Mi ĉiam diris, kaj nun diras ĝin denove: Vi estas facilanima homo, tre facilanima homo! Kiu nu estu la avantaĝo, se Vi estas mortpikota, ĉu? Do klarigu tion al mi!“

„La avantaĝo, ĉu? Mi mortos, nenio plu.“

„Ĉu nenio plu? Do ne eĉ ŝercaĉu! La morto estas ĉio, kio povas okazi al iu. Kiam iu mortas, nenio plu povas okazi al li.“

„Sed jes!“

„Ĉu jes? Kio, ekzemple?“

„Oni povas esti enterigata.“

„Firmtenu la bekon, kara *Sir!* Se Vi scias fari nenion, escepte de krom ĉia ofendo eĉ ĉagreni min, mi deziras, ke mi estus malŝparinta mian simpation al iu pli digna homo.“

„Ĉu Vi vere sentas Vin ofendita, Sam?“

„Nature mi sentas. Do ne demandu tiel stulte! Ja preskaŭ certas, ke Vi estas neigota, komplete neigota. Kion utilan mi tiam faru poste, en mia aĝo, en tiu mondo? He, kion mi

faru? Mi devas havi *greenborn*:on, kun kiu mi povas disputi de tempo al tempo. Kun kiu mi disputu, kiam Vi estos mortpikita?“

„Tute facile, Vi disputu kun alia *greenborn*.“

„Tio pli facile direblas ol fareblas. Tiam kompletan kaj neplibonigeblan *greenborn*:on kiel Vi, mi trovos neniam denove mian tutan postan vivon. Sed mi diras al Vi, *Sir*, se io okazos al Vi, la ruĝuloj memoru min por ĉiam! Mi kuros inter ilin kiel furioza berbero, kaj—“

„Berserko, berserko Vi volis diri, kara Sam“, mi interrompis lian parolon.

„Tute egalas al mi, ĉu mi tiam estos furioza berserko aŭ berbero. Mi simple ne povas toleri, ke Vi estu mortpikata. Kaj kio pri Via konscienco? Mi scias, ke Vi havas bonan koron, kaj ne ŝate mortigas homon. Vi ja ne havas kaŝan intencon indulgi la kontraŭulon, kun kiu Vi batalu, ĉu?“

„Hm, hm!“

„Hm, hm, ĉu? Ĉesu Vian hm-hm:adon! Vi batalos pri vivo aŭ morto, *Sir*!“

„Kio, se mi nur lezos lin?“

„Tio ne eblas, laŭ la kondiĉoj.“

„Mi volis diri: kio, se mi lezos lin tiel, ke li ne plu povas batali?“

„Same neblas. Tiukaze vi ne estos la venkanto, kaj devus komenci novan batalon kun alia kontraŭulo. Vi ja aŭdis, ke la venkota mortu. Se Vi volas iĝi brava okcidentulo, Via tranĉilo estos ankoraŭ gustanta multajn pecojn da homa karno. Memoru, ke tiuj kajovajoj ĉiuj estas rabemaj fiuloj, ke ili kulpas pri ĉio, kio okazas nun, ĉar ili ŝtelis la ĉevalojn de la apaĉoj.“

„Se ĝi trankviligos Vin, estu konvinkata, ke mi ne indulgos. Same ja ne ekideos al li kompati min.“

„Bone! Tiu estas vorto, kion mi supozas validi. Tamen mi sentas, kvazaŭ mia filo estu kondukata al la buĉejo. Pli ŝate mi volus batali, anstataŭ Vi. Ĉu Vi ne volas transdoni tiun taskon al mi, *Sir*?“

„Ne, plej kara Sam. Unue, ĝi estas pli bone, se ekmortas *greenborn* kiel mi, ol olda brava okcidentulo kiel vi, kaj due—“

„Tenu la bekon! Ne gravas, se ekmortas mi maljuna ulo. Sed se ekmortas tia juna—“

„Sed tenu la bekon nun Vi!“ mi interrompis. „Due estus nur senhonore kaj malkuraĝe de mi, se mi cedus kaj lasus alian batali anstataŭ mi. Krome la ĉefo ne akceptos tion, ĉar li ja celas rekte al mi.“

„Ĝi ja estas ekzakte tio, kion mi ne komprenas! Li celas al Vi, ĵus al Vi. Mi esperas, ke lia kanoto naĝos en direkton, al kiu li ne direktigis ĝin. Atentu, ili venas!“

La indianoj nun venis malrapide marŝante. Ili estis malpli ol ducent, ĉar kelkaj el ili estis restintaj ĉe la kaptitaj apaĉoj kiel gradistoj. Tangua kondukis ilin preter ni, ĝis la loko, kiun ni elektis. La kajovajoj stariĝis, formante trikvaronan cirkolon. La kvaran kvaronon plenigis ni blankuloj. Tiam la ĉefo mansignis. El la aro de la ruĝuloj paŝis militisto kun vere heroulaj korpoformoj, kaj demetis ĉiujn siajn armilojn, escepte de la tranĉilo. Poste li nudigis la supran parton de sia korpo. Ajn kiu vidis liajn malkovratajn muskolojn, sentu aflikton kaj timon pri mi. La ĉefo kondukis lin en la mezon, kaj anoncis per voĉo, kiu sonis plene je venkcerteco:

„Jen staras Metan-akva, la plej forta militisto de la kajovajoj, kies tranĉilo venkas ĉiun malamikon. Oni nomas lin Fulmotranĉilo, ĉar la kontraŭulo falegas sur la teron per lia tranĉilo, kvazaŭ batita de la fulmo. Li batalos kontraŭ Old Shatterhand, la palvizaĝo.“

„*Heavens!*“ Sam flustris al mi. „Tiu estas vera Goljato! Aŭskultu, kara *Sir*, Vi estas pereanta!“

„*Psban!*“

„Ne iluziadu ion! Ekzistas nur unu maniero venki tian ulon. Ne permesu longan bataladon, sed zorgu pri tre baldaŭan finon, alie li lacigos Vin, kaj neigos Vin des pli certe. Kio pri Via pulso?“

Li prenis mian manartikon kaj nombris. Tiam li pluis:

„Dank' al Dio, ne pli ol sesdek batoj, do tute normale. Ĉu Vi do ne estas ekscitita? Vi ne havas timon, ĉu?“

„Tiu ja trous! Ekscito kaj timo en situacio, kie la vivo dependas de trankvila koro kaj vido! Ni ja vidos, ĉu tiu ulo vere estas nevenkebla.“

Dum tiuj vortoj mi nudigis mian supran korpon. Tio ne estis unu el la kondiĉoj, sed ne aperu la dubo, ke mia vestaĵo servu kiel savilo kontraŭ la tranĉilo de la kontraŭulo. Mi donis la ursmortigilon kaj la revolveron al Sam. Tiam mi paŝis en la mezon de la cirklo. La koro de la bona Sam bategis. Mi sentis neniun timon.

Nun sufiĉe granda ok estis fosetata en la sablon. Tiam la ĉefo ordonis al ni stariĝi sur niajn poziciojn. Fulmotranĉilo esploris min malestimante, kaj laŭte diris:

„La korpo de tiu malforta palvizaĝo tremas per timo. Ĉu li riskos iri en la ringon en la sablo?“

Li apenaŭ diris tiujn vortojn, kiam mi estis stariĝinta en la sudan cirklon de la ok. Mi havis gravan kaŭzon por tio. Fakte mi tiel havis la sunon malantaŭ mi, dum li estis blindetigata per ĝi.

„Li fakte ĝin riskas!“ Fulmotondro mokis. „Mia tranĉilo lin formanĝos. La Granda Spirito donas lin en mian manon. Li forprenis lian prudenton.“

Inter la indianoj kutimas tiaj parolaj antaŭludoj. Se mi estus silentinta, mi estus sopzita esti malkuraĝa. Tial mi respondis:

„Vi batalas per la buŝo. Sed mi staras tie ĉi, kun la tranĉilo. Stariĝu en la cirklon, se vi ne timas!“

Li stariĝis en la alian cirklon de la ok per unu salto, kaj kriis kolere:

„Ĉu timas? Ĉu Metan-akva timu? Ĉu vi aŭdis tion, militistoj de la kajovajoj? Mi forprenos la vivon de tiu blanka hundo per la unua piko!“

„Mia unua piko neigos vian vivon. Nun silentu! Vi ne estu nomata Fulmotranĉilo, sed Grandbuŝo.“

„Tiu malodora kojoto aŭdacas ofendi min! La vulturoj manĝos liajn internaĵojn!“

Tiu minaco estis klarigaĵo, eĉ stultaĵo de li. Ĝi malkovris al mi, kiel li volis uzi sian tranĉilon. Miaj internaĵoj! Do verŝajne ne pikon en la koron, sed baton de malsupre supren, pro distranĉi mian ventron.

Ni staris tiel proksime al la alia, ke oni nur bezonis kliniĝi iomete, pro atingi la kontraŭulon per la tranĉilo. Li fiksigardis al mi en la okulojn. Lia dekstra brako pendis malstreĉe. Li tenis

la tranĉilon tiel, ke la tenila fino estis je la etfingro, kaj ke la klingo eksteriĝis inter la dika kaj monta fingro. Do li vere volis fari baton de malsupre supren, ĉar ajn kiu volas bati de supre malsupren, tenas la tranĉilon inverse, tiel ke la tenilfino estas je la dikfingro, kaj ke la klingo iĝas el la pugno je la etfingro.

Do mi sciis la direkton de lia atako. Nun ankoraŭ gravis ekscii la momenton. Tiun liaj okuloj malkovru al mi. Mi konis la tipan, fulmegan tremeton, kiu rimarkeblas en ĉiuj tiaj kazoj. Mi mallevis la palpebrojn, pro igi lin pli memcerta, sed rigardis lin des pli atente tra la okulharoj.

„Ekpiku, hundo!“ Fulmtranĉilo postulis.

„Ĉesu parolaĉi, kaj agu, vi ruĝa knabo!“ mi respondis.

Tio estis ofendo, kiun sekvu aŭ kolera respondo, aŭ la atako. La dua okazis. Fulmeca ekvastetiĝo de lia pupilo ĝin anoncis al mi. En la sekvinta momento li forte elpuŝis la dekstran brakon kun la tranĉilo antaŭen, kaj ŝiris ĝin supren, pro distranĉi mian ventron. Se mi estus ekspektinta baton de supre malsupre, mi nun estus pereanta. Sed tiel mi paratis lian atakon, perke mi pensrapide batis mian klingon malsupren, kaj tranĉis en lian antaŭbrakon.

„Hundo, fava!“ li vokegis, retiris la brakon, kaj lasis la tranĉilon fali per ekteruro kaj doloro.

„Ne parolu, sed batalu!“ mi respondis, kaj levis mian brakon. Tiam mia klingo iĝis en lian koron laŭlonge. Mi tuj retiris ĝin. La piko trafis tiel bone, ke elŝprucis forta sangostrio. La grandulo ŝanceliĝis nur unu fojon jen kaj reen, volis krii, sed kapablis nur suspiran ĝemeton, kaj tiam falis sur la teron.

La indianoj komencis koleran hojladon. Nur unu el ili ekvokis ne, Tangua. Li alvenis, kliniĝis super mia kontraŭulo, palpumis la randojn de la piklezo, rerektiĝis, kaj rigardis min per vido, kiun mi longe poste ne povis forgesi. En ĝi estis miksaĵo el kolero, teruro, timo, admiro kaj agnosko. Tiam li volis foriĝi senvorte.

„Ĉu vi vidas, ke mi ankoraŭ staras en la cirklo?“ mi diris. „Metan-akva forlasis sian cirklon, kaj nun kuŝas ekster la limo. Kiu venkis?“

„Vi!“ li ŝuŝis kolere, kaj foriris. Post kvin aŭ ses paŝoj li ekrevenis, kaj kraĉospiris al mi: „Vi estas blanka filo de la Malica Spirito. Nia medicinisto prenu la sorĉon for de vi. Tiam vi donu vian vivon al ni!“

„Via medicinisto faru, kion li volas. Sed vi nun plenumu vian promeson.“

„Kiun promeson?“ li moke demandis.

„Ke la apaĉoj ne ekmortos.“

„Ni ne mortigos ilin. Mi promesis, kaj plenumos tion.“

„Kaj ili estos liberaj, ĉu?“

„Jes, ili regajnu la liberecon. Kion Tangua diras, tio okazos.“

„Tiukaze mi nun iros kun miaj amikoj, pro malkateni la kaptitojn.“

„Tion mi faros mem, kiam la momento ĝustos.“

„Ĝi ĝustas nun, ĉar mi venkis.“

„Ĉu ni interkonsentiĝis pri la tempo kiam?“

„Ĝi ne estis speciale menciita, sed ja kompreneblas per si mem, ke—“

„Silentu!“ li tondrumis al mi. „La tempon decidis mi! Ni ne mortigos la apaĉajn hundojn. Sed kiel ni povas eviti, ke ili ne ekmortos, kiam ili ricevos nek manĝaĵojn nek akvon? Ĉu estos kulpo mia, kiam ili ekmortos per malsato kaj soifo, antaŭ mi povos liberigi ilin?“

„Fiulaĉo!“ mi diris en lian vizaĝon.

„Hundo, parolu nur unu vorton plu, kaj—“

Li volis finiĝi sian minacon, sed interrompiĝis meze en la parolo, kaj vidis ektimigite en mian vizaĝon, kies mieno ŝajne tute ne plaĉis al li. Mi pluigis lian interrompitan parolon:

„— mia pugno batos vin teren, vi insidema mensogisto!“

Li rapide faris kelkajn paŝojn reen, ekprenis sian tranĉilon kaj minacis:

„Via pugno ne fojon plu proksimiĝos al Tangua. Mi tuj terenpikos vin.“

„Fulmtranĉilo diris la samon. Nun li kuŝas tie. Kaj la samo okazos al vi. Kiu okazu al la apaĉoj, pri tio mi interkonsilos kun miaj blankaj fratoj. Se vi malrektigas nur unu haron de ili, vi kaj viaj anoj estos neigataj. Vi scias, ke ni kapblas ekblovegi vin ĉiujn en la aeron.“

Maljam post tiuj vortoj mi forlasis la limon de la batalejo, kaj iris al Sam. Per la vekriado de la ruĝuloj li ne povis aŭdi, kio estis diskutata inter mi kaj la ĉefo. La malgrandulo kuris renkonte al mi, prenis min per ambaŭ manoj, kaj vokis per jela plezuro:

„Bonvenon, bonvenon, *Sir!* Vi revenas el la regno de la morto, en kiu vi jam ŝajnis restonta ĉiame. Homo, amiko, junulo kaj *greenborn*, kia kreaĵo Vi estas! Neniam estis vidinta bubalon, kaj mortpafas la plej fortan el la aro! Neniam estis vidinta grizurson, kaj mortpikas ĝin, kvazaŭ li mortpikus pomon! Neniam estis vidinta mustangon, kaj kaptas mian novan Mary:n! Kaj nun stariĝas antaŭ la plej faman ruĝan tranĉilulon, kaj trafas meze en lian koron, senke li mem perdas unu sangeron! Dick kaj Will, venu tien ĉi, kaj rigardu tiun strangan *surveyor*:on! Kio nur iĝos el li?“

„Submajstro“, Stone ridetis.

„Submajstro, ĉu? Kion Vi volas diri per tio?“

„Li pruvis denove, ke li ne plu estas *greenborn* kaj lernanto. Ni nomu lin submajstro. Tiel li rajtas iĝi majstro pli poste.“

„Ne plu *greenhorn*, ĉu? Se eĉ Vi foje volas diri ion, almenaŭ ne elpuŝu nematurajn vakciniojn! Tiu ulo estas *greenborn*, tute kaj plene, alikaze li ne estus riskinta batali kun tiu grandega indiano. Senprudentaj homoj ja ĉiam havas la plej grandan feliĉon, kaj la plej stultaj kamparistoj ja ĉiam rikoltas la plej grandajn terpomojn. Same ĝi estas pri li: stulta, senprudenta, *greenborn*. Ke li ankoraŭ vivas, li ŝuldas nur al sia stulteco, se mi n'eraras. Kiam ĝi komencis, mia koro preskaŭ ekĉesis bati. Mi apenaŭ ne povis spiri, ĉiuj miaj pensoj okupiĝis pri la testamento de tiu *greenhorn*. Unu bato, unu puŝo, kaj la ruĝulo ekkuŝis sur la tero! Nun ni sukcesis, kion ni volis: la vivon kaj la liberon de la kaptitaj apaĉoj!“

„Pri tio Vi eraras“, mi respondis, sen koleriĝi pri lia parolado.

„Mi eraras, ĉu? – Kial?“

„Kiam Tangua faris sian promeson, li samtemp planis trompi nin.“

„Mi ja antaŭsciis, ke li havis kaŝajn intencojn! Sed kion li diris al Vi?“

Mi ripetis la vortojn de Tangua. Sam ekkoleris pri tio, kaj li tuj iris al Tangua pro postuli klarigon. Mi uzis la etan paŭzon pro surmeti miajn vestaĵojn, kaj repreni miajn armilojn.